

Mu Du,
Rigardo sur Nanjingon

tradukita de Manfred Retzlaff

Papava kamp' en verdo lulas sin.
Malsupre la rivero fluas.
La kanto de la merloj ravas min.
Ĉe la dekliv' vilaĝ' situas.

Sagao-riĉaj temploj kiel or'
briletas jen en suna lumo,
kaj la tegmentoj altaj en la for'
disfluas en vespera fumo.

*Traduko de la ĉina poemo "Jiāngnán Chūn" de MU DU (Du Mu, *803 – †852) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-938-1884 (2013-11-22 19:33:51)